

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Albana proverbo: La vilag'o atendas vin lau' vesto kaj kondukas vin lau' menso

Nr 54 Au'gusto 2004

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio
Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758
(Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)

Rete: pistolia@yahoo.com , apistoli@aol.com (Vasil Pistoli); selimib@albmail.com (Bardhyl Selimi); adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani); hamotto@aul.com.al (Martha Otto) ; asokoli@bkurismeve.com.al **Nehat Sokoli**; beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi); sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti); mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri); dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com ; egli_b@wp.pl (Egli Brati) ; eltonzaimi78@yahoo.com (Elton Zaimi)

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

You can access the group's web features using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

You can access the group's Management page using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

ENHAVO

Nia movado: Seminario TAMEN, novaj'oj el Britio, alvoko de Pasporta Servo
AEI kaj AIS (Propono, Nova klasprojekto, nomlisto lak limdatoj de bakalau'rotoj kaj
magistrotoj)

Informoj el la Studumo

AEI kaj ILEI (afis'o de Juna Amiko, raporto de ILEi estraro)

AEI kaj UEA

Rakonto de Spomenka S'timec

Ni provu traduki el la Albana al Esperanto

Fremduloj pri Albanio

Informoj de Henri Masson

El la diplomalaboraj'oj de niaj studentoj
Humoraj'oj (pri Nastradino, pri Ezopo)
La albanaj tradicioj

Nia movado

Pri Seminario "TAMEN" okazanta en Teslic de la 7-a ghis la 10-a de oktobro 2004. vi povas legi cxi-sube aux en aldonata dokumento je PDF-formato [nur por la listoj, kiuj permesas tion].

TAMEN - **oficiala** - **alvoko**

Esperanto-Societo "Teslic" el urbo Teslic (Respubliko Srpska, Bosnio kaj Hercegovino), kunlabore kun Europa Esperanto-Unio, organizos en venonta oktobro tritagan seminarion en Banja Vrucica apud Teslic sub nomo TAMEN (Teslicxa Alvoko Movigi al Euxropa Nacieco). Gi estas destinita al junuloj kaj junaj mezagculoj (gcis 40 jaroj) el Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino, Serbio kaj Montenegro, Makedonio kaj Albanio. La programo enhavos interalie: 1. Interkonatigco kaj individua perspektivo 2. Kion ni atendas de Europa Unio ? 3. La kulturo de niaj najbaroj kaj regionoj 4. Organiziteco de EU 5. Cxu ni perdos nian suverenecon ? Alveno je jxauxdo, la 7a de oktobro, en la bankuveja loko Banja Vrucica, hotelo "Kardijal" (3 km for de Teslic). Foriro je dimanco, la 10a. Kostoj de partopreno: 25 BAM (1 BAM = 0,51 ?). Viaj vojaĝkostoj estos duone rembursitaj. Vi povas aligxi cxe <http://www.esperanto.rs.ba/tamen>. Ankaux oni povas peti aligxilon de EST, Radolinka BB, BA-74270 Teslic, Resp. Srpska - Bosnio kaj Hercegovino aux telefone ++387 53 436-572 aux retposte est@teol.net. Aligxu gxis la 25a de julio 2004. La seminarion subvencias la nederlanda pacmovado IKV kaj Euxropa Esperanto-Unio. Prepare al TAMEN ili invitas cxiujn Euxropajn gejunulojn en landoj, kiuj ne estas membroj de Euxropa Unio aux kiuj jxus aligxis, doni sian opinion en eseo aux 'kolumno' de minimume 200 kaj maksimume 500 vortoj, rilate al jenaj du tezoj: 1. Mia lando ja (devas aligxi/prave aligxis) al Euxropa Unio, sed (sekvas konsiderado kiel via lando profitos au malprofitos de EU-membreco). 2. Mia lando (devas aligxi/prave aligxis) al Euxropa Unio, car (sekvas konsiderado kiel EU profitos de membreco de via lando). Kompreneble povas eniri multaj temoj: ekonomia evoluado, politika stabileco, kultura ricxigo, socia novigado, pli da eblecoj por Euxropo en la mondo, ktp. Sendu vian kontribuon antaŭ la 1a de septembro al: Johan Derks, Rietgors 40, 8271 GH IJsselmuiden, Nederlando. Al la ensendintoj kelkaj interesaj esperantaj libroj estos lotumataj. Menciui kiun libron vi sxatus ricevi (ne pli ol 20 ?), se vi gajnos.

EAB novaj'oj

2. POLISH MAINSTREAM CANDIDATE - IN ESPERANTO:

Throughout Silezia, posters are to be seen, showing Esperantist Margareta Handzlik, of Platforma Obywatelska, the most popular party in Poland. "For 15 years with my husband George, I have run a number of companies: The publishing company KLEKS, which publishes books in Polish and Esperanto... ", says the Esperanto version of her website. Her whole family speaks Esperanto. She is number three on her parties

list, and stands a good chance of being elected. Polish Radio will broadcast an interview with her in their Esperanto language service this evening (Thursday, June 10), at 21.30 (Click on 'auskultu').

3. 'ESPERANTO LIST' GETS TV COVERAGE IN FRANCE

Voters in France will have the chance to vote for the EDE list: 'Europe-Democracy-Esperanto'. This move is controversial within the Esperanto movement, since Esperanto is above party politics, and it is entirely separate from the politically neutral national association. However, it does appear to be bringing public attention to Esperanto and the language issues. A Hugh increase in numbers of website visits and people taking up Esperanto courses over the Internet is being reported, following the the EDE's television advertising. The video clips can be seen over the Internet.

4. IN THE UK

The BBC Radio 4 programme You and Yours featured Esperanto on Friday June 4, with an introduction about the European elections. None of the main parties had included Esperanto in their election manifestos, said the announcer, giving a brief overview of the relevance to the EU elections. The rest of the seven-and-a-half mintue broadcast was taken up with interviews with professor John Wells, professor of phonetics at Unversity College London, Dr Marjorie Boulton, Esperanto author in Oxford, and the Esperanto-speaking Tellier family in Felixstowe. The whole feature can be heard again over the Internet in RealAudio from the programme's website, or over the RadioAktiv website in mp3.

A display of sixteen photos of candidates who would like the European Parliament to consider the use of a neutral pivot language such as Esperanto can now be viewed on the Esperanto Britain website. It seems that many candidates have missed the point that a pivot language is for translation services, rather than a language which would be learned by the MEPs. Many candidates expressed sympathetic views on Esperanto, but put it in contrast with the idea of preserving linguistic diversity, rather than as a means of achieving linguistic diversity. The latest candidates line-up can be seen in the adjacent story.

Alvoko de Pasporta Servo

From: Pasporta Servo [pasperv@wxs.nl]

Sent: Monday, July 19, 2004 8:36 PM

Subject: **Bonvolu helpi tutmondigi Pasportan Servo**

Mi estas la kompilanto de Pasporta Servo de TEJO (<http://www.tejo.org/ps>).

Se vi ne jam estas gastiganto / uzanto: gxi estas internacia gastiga reto per kiu Esperantistoj povas senpage tranokti cxe pli ol 1200 adresoj en 79 landoj tutmonde. Cxiujare aperas nova adreslibro. Oni bezonas nur acxeti gxin por uzi la servon. Gastigantoj povas ricevi gxin senpage. Eblas uzi Pasportan Servon en multaj landoj, sed la gastigantoj estas tre malegale distribuitaj. Duono de la landoj havas nur tri gastigantojn aux malpli, dum duono de la gastigantoj logxas en nur dek landoj! Tial mi nun skribas al vi, cxar mankas gastigantoj por Pasporta Servo en via lando. Mi esperas ke vi povos helpi por diskonigi la servon en via lando, por ke pli da Esperantistoj povu gxui la servon kaj/aux farigxi gastiganto. Pli da E-vizitantoj al viaj lando signifos pli da agado, pli da praktikado kaj pli da entuziasmo. Kaj espereble ankaux pli da homoj el via lando uzos la servon por mem vojaĝxi kaj sperti la avantaĝojn de internacia gastigado per Pasporta Servo, kaj tiel ankaux la avantaĝojn de Esperanto. Vi povas facile helpi, ekz-e per jenaj manieroj: - aperigi informon pri Pasporta Servo en landa aux regiona E-gazetoj

(ekz-e http://www.tejo.org/ps/ps_lingv/ps_inf_eo.htm) - disponigi aux disdoni tekston pri kaj aligxilon por Pasporta Servo dum viaj renkontigxoj (ekz-e http://www.tejo.org/ps/aligxilo_pdf.zip) - en landa aux regiona ttt-ejo, aldoni ligan al la ttt-ejo de Pasporta Servo (<http://www.tejo.org/ps>) - traduki jenan informpagxon ankaux al via lingvo: http://www.tejo.org/ps/ps_lingv/ps_eo.htm Se vi deziras pli da informoj, ne hezitu kontakti min. Mi volonte sendos kelkajn paperajn aligxilojn se tio utilis. Limdato por la venonta eldono 2005 estos la unua de novembro. Ne hezitu plusendi tiun cxi peton al redaktoroj de revuoj, organizantoj de renkontigxoj, estroj de hejmpagxoj ktp ktp! Kaj se vi ne jam gastigas, konsideru mem farigxi gastiganto kaj ricevi la adreslibron senpage! Mi antauxdankas pro via helpo.

Derk Ederveen

AEI kaj AIS

Propono al AIS

Kara Alicja, esperante ke vi c'iuĵ bonfartas, mi havas proponon al vi (al Senato de AIS pli g'uste..). Jen g'i: Kiel sciite jam bakalau'rig'is kelkaj albanaj gestudentoj. La temoj de iliaj diplomlaboraj'oj plejmulte rilatis al Albanio, al ties arkeologio, historio, etnografio, turismo, naturaj monumentoj, pejzag'o, ktp. Mi havis la bons'ancon tralegi preskau' c'iuĵn ties laboraj'ojn kaj iukaze helpi per sugestoj kaj recenzoj. Mi povas kolekti c'iuĵn laboraj'ojn en mia komputilo kaj fari el ili gvidlibron pri Albanio, c'erpante fragmentojn, ideojn, fotojn, ktp. La libro havas kiel au'torecon do niajn gestudentojn, dum mi mem estos redaktoro. Kompreneble, tio estus granda okupiteco por mi, sed tamen necesa kaj utila, c'u por ni albanoj dezirantaj diskonigi nian landon al fremduloj c'u por AIS kaj ties klerigejo, sen kiu tia laboro ne estig'us ja. Por kovri la eldonkostojn kiuj por tiaspeca gvidlibro estus relative altaj ec' por Albanio, (ni diru g'is 3000 eu'roj por 1000 ekzempleroj) mi petus la gestudentojn mem kontribui kaj petas vin, Senaton de AIS same, je kondic'o ke post la vendo kaze de iu internacia renkontig'o, ekz. UEA kongreso en Litovio venontan jaron, la kontribuintoj rericivi sian monon. Mi mem ne disponas pri mono, c'ar mia monata salajro apenau' estas 160 eu'roj.

Kion sugestus vi? C'u eblas kaj indas tia entreprenado?

Salutojn, **Bardhyl**

14 Europa Esperanto Forumo

Dum 11-18 de junio 2004 okazis 14 Europa Esperanto-Forumo organizita de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz kaj S-ro Marcel Delforge, kiu kun E-grupo el Charleroi aranĝis bonegan restadon en Belgio. La vojaĝon kaj la Forumon partoprenis ĉefe tri polaj ensembloj: Folkloro horuso "Maresci" el Cewice en Kaszubio, Ensemblo „Krajna” el Kamień Krajeński kaj E-horuso „Gaja Velo” el Gdynia. Veturante al Belgio oni vizitis Berlinon kaj Luksemburgon. Dum la restado en Belgio (12-17 de junio) okazis vojaĝoj al Ostende kaj Brugxo kun sxipekskurso tra kanaloj de Brugxo kaj kun bonega E-gvidado tra cxarmaj stratetoj de mezepoka Brugxo. La 14-an de junio la ensembloj vizitis Parizon kaj la 15-an de junio - Charleroi kun koncerto por esperantistoj kaj membroj de Pola-Belga Societo de Amikeco. Samtempe okazis vizito en Waterloo lige kun datreveno de la Batalo la 18-an de junio 1815 j. La 16-an de junio oni koncertis en lernejo kaj vizitis European Komisionon kaj Parlamenton en Bruselo kaj ankaŭ kun bona E-gvidado la Bruselan Parlamenton kaj ĉefurbon de Belgio. Vizito en Botanika Gxardeno en Huizingen kaj amika adiaŭa vespero kun belgaj esperantistoj fermis la Forumon. Revenante el Benelukso la ensembloj vizitis survoje Antverpenon, Rotterdemon kaj Amsterdamon, kie ĉefe impresis sxipekskursoj tra kanaloj de „Venecio de Nordo“. Lastan tagon (la 18-an de junio) oni vizitis Hamburgon kaj fine koncertis en Mielno apud Koszalin por pli ol 50 partoprenantoj de la 26-a Cxebalta Esperantista Printempo (CxEP), kiuj cxijare venis el 10 landoj. La aranĝon jam de 26 jaroj bonege organizas Czeslaw Baranowski. Cxiuj revenis tre kontentaj, planante novajn Esperanto-vojaĝojn en 2005 jaro, ankaŭ fine de junio 2005 al la 15-an Europa Esperanto-Forumo en Benelukso kun Parizo. Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz www.esperanto-turismo.com

Ideoj pri nova klas-esplorprojekto

Karaj AIS-kunlaborantoj,

mi ricevis viajn retposxtadresojn de Renato Corsetti kaj esperas ke vi pardonas min por sendi cxi tiun mesagxon al vi cxiuj. Mi tre gxojus se vi sxatus legi la malsupran tekston pri ideoj por nova klas-esplorprojekto kaj komenti gxin. Ecx pli mi gxojus se vi volus iel envolvigxi en la projekton! (Miakomprene pluraj el vi helpis pri la studo <http://wwwcs.upb.de/extern/fb/2/Kyb.Paed/loi/>. Mi mendis gxin de la libroservo de UEA kaj intencas legi gxin dum la venontaj semajnoj.) Bv skribi al mi se vi havas komentojn aux intereson pri la malsupra projektideo. Antauxdanke, Hokan Lundberg (Beogrado, estrarano de ILEI) (Jen se vi preferas version de la teksto en Virdo: http://ikso.net/ilei/dok/klas-esplorprojekto_v2.1.doc)

** Ideoj pri nova klas-esplorprojekto ** Versio 2.1 (2004-07-03) (Versio 1 legeblas cxe <http://ikso.net/ilei/vikio/Esplorprojekto> kaj http://ikso.net/ilei/vikio/Esplorprojekto_Diskuto trovigxas rilataj komentoj de Duncan Charters, Renato Corsetti, Claude Piron kaj Zlatko Tisxljar.)

* Enkonduko* Ni kredas ke Eo povus havi gravan rolon en bazaj lernejoj, la "cetera mondo" kredas ke ne. Se iu neuxtrala esplorinstanco sukcesus montri ke lernado de Eo en bazaj lernejoj, longperspektive, helpus la lernejanonjn pli facile atingi certan nivelon de plurlingvismo kaj interkultura kompetento, eble ekestus iom pli da intereso pri Eo. Por fari seriozan kaj konvinkan esploron pri la utilo de Eo en bazaj lernejoj necesus multe da tempo, grandaj rimedoj kaj neuxtrala esplorinstanco. Unu maniero provi konvinki iun

neutralan esplorinstancon fari tian seriozan esploradon estus fari projekton kiu povus esti rigardata kiel "antauxstudo" pri la utilo de lernado de Eo en bazaj lernejoj kaj poste uzi la rezultojn de tiu "antauxstudo" por lobi cxe la "cetera mondo". Pri tia projekto / "antauxstudo" temas cxi-dokumento.

* Celoj de nova klas-esplorprojekto * 1. Montri cxu Eo estas relative facile lernebla lingvo por lernejoj. 2. Montri cxu lernado de Eo faciligas al lernejoj lerni la anglan (aux alian etnan lingvon). 3. Montri cxu inter-lernejana komunikado per Eo levas nivelon de interkulturaj interkomprenigxo kaj komptento (pli ol post samlonga uzado de etna lingvo). 4. Starigi novajn kontaktojn kun la "cetera mondo". Klarigo: Per aliaj vortoj, provi montri ke indas instrui Eon al infanoj en bazaj lernejoj. Jam estas faritaj pozitivaj esploradoj pri celoj 1 kaj 2, sed cxiam indas konfirmi kaj plibonigi ilin. Celo 2 versxajne helpas nin povi konvinki politikistojn, lernejojn, instruistojn, lernantojn kaj gepatrojn ke indas por klasoj partopreni en la projekto. Celo 3 estas grava i.a. por aliri eksterajn fondajxojn. Celo 4 estas tute necesa por la projekto kaj la E-movado gxenerale, kaj povus krei bazon por posta projekto en formo de lobiado al internaciaj kaj esplorneutralaj instancoj pri pli granda studo kun similaj celoj.

* Longdauxra celo de la projekto * - Enkonduko de Eo en bazajn lernejojn. Klarigo: "... sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en cxiuspecajn lernejojn..." (El punkto 4.1 de la statuto de ILEI.) La enkonduko de Eo en (bazajn) lernejojn certe ne okazos baldaux, sed sen nia provado starigi kontaktojn kun la "cetera mondo" per informado, eksperimentoj, esplorado, prezentado de esplorrezultoj en fakaj revuoj, subvencipetoj al kaj kunlaboro kun eksteraj fondajxoj, plurlingvaj konferencoj pri Eo/lingvo-instruado k.s. gxi versxajne okazos neniam...

* Celgrupoj de la projekto * - Lernejoj 9- gxis 15-jaraj. - Instruistoj kiuj jam konas Eon kaj laboras en lernejo kiu estas suficxe malfermita al Eo kaj al esplorprojektoj pri lingvolernado. - Instruistoj, kiuj ne konas Eon, malfermitaj al Eo kaj al esplorprojektoj pri lingvolernado. Klarigo: Infanoj en multaj landoj eklernas fremdan lingvon kiam ili estas cx 9-jaraj, kaj pro tio bonus komenci la Eo-instruadon jam tiam. Se ankaux "normalaj / ordinaraj" (lingvo)instruistoj unue lernas Eon kaj poste instruos Eon al la infanoj, la fidindeco de la tuta projekto povus kreski kaj krome estus pli facile grandskaligi la projekton.

* Pri la eksperimento / esplorado kaj de gxi atendataj rezultoj * Ekzistas multaj manieroj fari la eksperimenton kaj la plej bona por cxi tiu okazo estas ankoraux diskutinda kaj difininda, sed cxi tie ni mallonge prezentas unu el la ebloj, por ilustru kion ni imagas:

1)- Ekzemple 5 klasoj lernas Eon kaj neniun alian fremdan lingvon dum 12 monatoj.

- Aliaj 5 klasoj lernas la anglan dum sammulte da tempo. 2) 6 kaj 12 monatojn ekde eklernado ni komparas la lingvonivelojn de la du grupoj por kontroli "cxu Eo estas relative facile lernebla lingvo por lernejoj" (Celo 1). 3) - La "E-klasoj" cksesas lerni Eon kaj lernas la anglan dum 24 monatoj. - La aliaj klasoj dauxrigas lernadon de la angla dum 24 monatoj samkvante kiel la "E-klasoj". 4) Cxiun sesan monaton ni komparas la nivelon de la angla cxe ambaux grupoj por kontroli "cxu lernado de Eo faciligas al lernejoj lerni la anglan" (Celo 2). (Certe gravas atenti pri pluraj diversaj faktoroj kiam oni faras empirian esploradon, i.a. pri tio legeblas komentoj cxe http://ikso.net/ilei/vikio/Esplorprojekto_Diskuto.)

* Atendataj rezultoj * Testo 1 (post 6 monatoj): Iom pli alta lingvonivelo cxe la "E-klasoj". Testo 2 (post 12 monatoj): Signife pli alta lingvonivelo cxe la "E-klasoj". Testo 3

(post 18 monatoj): Multe malpli alta nivelo de la angla cxe la " E-klasoj". Testo 4 (post 24 monatoj): Iom malpli alta nivelo de la angla cxe la " E-klasoj". Testo 5 (post 30 monatoj): Simila nivelo de la angla. Testo 6 (post 36 monatoj): Pli alta nivelo de la angla cxe la "E-klasoj".

Kial atendi tiajn rezultojn? Jen kelkaj faktoroj kial lernado de Eo povus faciligi al lernejoj lerni novan etnan lingvon: - Ili ricevus bonan enkondukon al gramatikaj elementoj en konkreta maniero. - Tio iom liberigus ilin de la refleksoj de ilia(j) gepatra(j) lingvo(j). - Ili havus supozeble pli mildan vojon al novaj ortografioj. - Ili lernus plurajn "internaciajn vortojn" utilajn por lernado de "euxropaj lingvoj". - Tio alitigus ilian memfidon pri lingvolernado. - Ili malfermigus kaj alkutimigus al internaciaj kontaktoj, per partopreno en Interkulturo aux en Euxroskola. - Antauxaj eksperimentoj indikas tion, vidu la dokumenton STUDO (http://www.internacilingvo.org/public/126_plena.htm).

Claude PIRON, en sia libro "Le défi des langues" kelkpagxe, aliras la demandon el psikologia vidpunkto, la esperantigo de tiuj pagxo legeblas cxe: http://ikso.net/ilei/vikio/Esplorprojekto_Komento_De_Piron.

Cxi tie ni enmetas nur la lastan parton:

"Resume, la lernanto, por kiu Eo estas la unua fremda lingvo, renkontas la lingvomondon en procezo, en kiu abundas sentaj, estetikaj kaj intelektaj kontentigxoj. Li konkrete malkovras, ke sama ideo povas esprimigxi per tre malsamaj lingvaj rimedoj, tamen sen konstante fari la senkuragxigan sperton erari. Li akiras rimedon analizi la semantikajn rilatojn inter nocioj kaj la gramatikajn rilatojn inter la elementoj de propozicio. Li lernas relativigi la konceptojn de la gepatra lingvo. Li ekzercas la vocxajn organojn pri nova maniero prononci, tamen ne devante imiti modelon centprocente fremdan. La lernado de aliaj lingvoj limigxos por li al la alpreno de novaj kodoj. La fazo "senkondicxigo el la refleksoj de la gepatra lingvo" estos disvolvixinta en plej favoraj cirkonstancoj. Li scias, ke la aliaj lingvoj postulos pli strecxajn penojn, sed tiu unua lernado, sukcesinta, donas al li fidon. Li aliras la konkuron kun la sento esti bone trejnita. Lia lingva gimnastiko havigis al li forton, flekseblecon kaj lertecon. Tion li sentas. Kaj tio sxangxas cxion." (Claude PIRON)

Tamen en tiu cxi kazo versxajne pli gravas la empiriaj rezultoj ol belaj teorioj, almenaux por konvinki la "ceteran mondon" pri la utilo fari grandan seriozan esploron pri Eo en lernejoj.

* Eblaj pasxo de la projekto * Jen kelkaj el la pasxo por realigi la projekton: 1. Diskutado, konceptado, teamokreado 2. Ellaborado de esplorprocezoj 3. Subvencipetado (fokuso je subtenantoj de plurlingvismo kaj interkultura lernado) 4. Kreado de plurlingvaj informiloj 5. Informado al lernejoj kaj ev politikistoj 6. Konvinkado de lernejoj kaj instruistoj partopreni la projekton 7. Selektado de klasoj kaj kontrolklasoj 8. Trejnado de instruistoj pri Eo 9. Verkado / Preparado de materialoj por instrui Eon al lernejoj 10. Ellaborado de diversaj testoj kaj demandoj 11. Lingvoinstruado (ekz: dum la unua jaro Eo kaj la angla, ekde la dua jaro nur la angla) 12. Observado de la klasoj 13. Testado kaj taksado de lingvokonoj kaj la instruado 14. Prilaborado de rezultoj de la testoj kaj demandoj 15. Prezento de la rezultoj de la testoj kaj demandoj per i.a. plurlingva ttt-ejo. 16. [Reen al punkto 11, dum ekz tri jaroj] 17. Konkludado de la eksperimento 18. Verkado de artikoloj por gazetoj kaj fakaj revuoj 19. Preparado de nova fazo de la projekto (ekzemple lobiado por pli granda studo de neuxtrala esploringvostanco) (Ankaux indus pripensi kiel utiligi la projektojn Interkulturo kaj Euxroskola en la projekto.)

* Pri aliaj similaj projektoj

* La simila projekto NEIGHBOUR (<http://www.vanoostendorp.nl/interlinguistiek/neighbour/>) montrigxis tro ambicia kaj momente ne realigebla. Ni kontaktis homojn malantaux tiu projektideo (Wim Jansen kaj Marc van Oostendorp) sed ankoraux ne ricevis iujn reagojn. Ni estas en kontakto kun KEILEU (www.internacilingvo.org), sed sxajnas ke ili celas realigi sian projektideon (kiu ankoraux estas malklara por ni) nur se la Itala ministerio pri klerigado subtenos ilin.

* Rimedoj utiligindaj en la nova klas-esplorprojekto

* Pluraj utiligindaj rimedoj jam ekzistas, ekzemple: - Edukado.net - por subteni la instruistojn kiuj instruos Eon - lernu! - por subteni la instruistojn kiuj instruos Eon - Interkulturo - por instigi interklasajn kontaktojn kaj kreskigi interkulturemon - Lingva Prismo - por proksimigi lingvan diversecon kaj allogigi plurlingvismon - Flugiloj de Malfacila Vento - por trejnado de instruistoj pri E-instruado - Pasporto al la tuta mondo - por la klasoj kiuj lernos Eon - Juna amiko - por la klasoj kiuj lernos Eon (versxajne necesus iom faciligi la revuo) - Euxroskola - por utiligado de la akirita Eo-kapablo por internaciaj kontaktoj

Aliaj estus kreindaj, ekzemple: - Plurlingvaj paperaj informiloj - por politikistoj, instruistoj, gepatroj kaj lernejanoj - Plurlingva ttt-pagxaro - por facile povi traduki kaj disvastigi informojn / prezentojn - Esplormaterialoj - kiel testoj kaj demandoj

- Instrumaterialoj - por la E-klasoj (eble bonus havi lernolibron kies cxefa temo estus "Euxropo", tio povus helpi nin starigi kontaktojn kun eksteraj fondajxoj en Euxropo)

* Skizo de tempoplano * - Gxis 2005: Pripensado, legado de similaj studoj, diskutado

- Oktobro/novembro 2004: Unua plankunsido - Dum 2005: Unuaj subvencipetoj
Ellaborado de esplorprocezoj Sercxado de universitato/katedro kiu povos patroni la projekton Informado pri la projekto kaj trovado de klasoj Trejnado de instruistoj

Preparado de instrumaterialoj - Dum 2006: Unuaj klasoj eklernos Eon respektive la anglan - Dum 2007: Unuaj rezultoj pri "cxu Eo estas relative facile lernebla lingvo por lernejanoj" - Dum 2008 kaj 2009: Unuaj rezultoj pri "cxu lernado de Eo faciligas al lernejanoj lerni la anglan" - Dum 2010: Lobiado por pli granda kaj neuxtrala stuado

* Instancoj malantaux la projekto * Bonus se povus subteni la projekton: - ILEI, per laborfortoj - ESF, per esplorspertoj kaj financado- UEA, per informado kaj gxenerala subtenado - Katedro / Universitato, per esplorado kaj observado

* Eblaj teamanoj * Gxis nun montris intereson: - KOVATS Katalin: gvidado de kursoj pri Esperanto kaj metodiko por lingvoinstruistoj en la projekto - LUNDBERG Hokan: informado, trovado de homoj, ttt-pagxo - PETROVIC Sonja: konsiloj pri subvencipetoj kaj organiza subteno - MONASTIREV Vitalij: programado, trovado de homoj - CORSETTI Renato: gxenerala informado pri la projekto al esperantistoj - VOS Penny: faranta proponon al la Auxstralia registaro pri simila programo por kelkaj lernejoj en nia regiono kie ni ne havas duan lingvan instruadon sed devus havi gxin. Se sukcesa, ni certe sxatus partopreni. - CHARTERS Duncan: planado de la esplorprocezo kaj organiza subteno - PETROVIC Radojica: Interkulturo-aplikoj kaj organiza subteno

Grava!: Nomlisto kaj limdatoj por bakalau'rig'i kaj magistrig'i

Kara kolego Selimi,

Antau nelonge (2004-06-13) AIS severigis la kondic^ojn por la bakalaura kaj magistra ekzamenoj - precipe koncerne la nombro de postulitaj studunuoj - por adapti ilin al la europaj normoj.

Tamen, la nunaj studentoj de AIS rajtas fari la ekzamenon lau la malnovaj kondic^oj (40 studunuoj por bak., 80 aldonaj por mag.), sed nur dum la validecperiodo de siaj studentaj legitimiloj.

Pro tio mi s^atus atentigi, ke la legitimilo de Ervin Canga eksvalidos fine de 2005. Vers^ajne li ne plu sukcesos bakalaurig^i c^i-jare en Lublin - li ja bezonas ankau recenon de sia verko - sed estus konsilinde, se li farus la ekzamenon sekvontjare. (Se li tamen sukcesus por Lublin, des pli bone) Mi skribus tion mem al li, sed mi ne havas lian adreson - nek retan - nek pos^tan.

La sekvontaj albanaj kandidatoj estas:

Por bak:

Erjon Lati (2006)
Kejd Kasmi (2007)
Ulian Binozi (2009)

Por mag. (c^iuj 2006):

Matilda Sokoli
Egli Brati
Saimir Begollari
Fioralba Cena
Arta Kume

Elkore salutas
Dieter Quednau

Prof. Dr. H.D.Quednau Technische Universitaet Muenchen
Am Hochanger 13 Forstwissenschaftliche Fakultaet
DE-85354 Freising Forstliche Biometrie und Informatik
Tel: +49 8161 71-4765
Fax: +49 8161 71-4767
email: quednau@wzw.tum.de
url: <http://www.forst.wzw.tum.de/~quednau>

Estimara s-ino Brati,

Hodiau alvenis de vi sendita listo, kiun kompilis ISTK pri viaj studunuoj akiritaj en Bydgoszcz.

Se vi komparas tiun liston kun la kriterioj pri la AIS-studado, vi povas mem kontroli, ke tiu listo enhavas iom pli ol 50 aknoskeblajn studunuojn - por la magistra ekzameno vi bezonas 80 aldone al 40 uzitaj por la bakalaura ekzameno (do sume minimume 120).

Por memorigi mi aldonas mian leteron de 2004-06-15, en kiu mi klarigis la kriteriojn por agnoskeblaj studunuoj.

Afable salutas
Dieter Quednau

Date: Tue, 15 Jun 2004 21:34:07 +0200 (CEST)
From: Quednau Hans-Dietrich <quednau@wzw.tum.de>
To: Egli Brati <egli_b@wp.pl>
Subject: Re: magistra ekzameno

Kara bakalauro Brati,

Vers^ajne ekzistas kelkaj miskomprenoj rilate la AIS-studadon:

Por AIS ne estas automate agnoskeblaj c^iuj kursoj de la ISTK (nun: AKB) en Bydgoszcz, c^ar la studumo ne estas universitato.

Agnoskeblaj estas nur tiuj kursoj, kiujn gvidis anoj de AIS (au docentoj de universitato) kaj ekde la studjaro 2002/2003 nur tiuj, kiuj estas finitaj per sukcesa kursfina ekzameno.

Bedaŭrinde en la jaro 2002 Aneta Bedkowska ankoraŭ ne estis ASci de AIS - do s^iaj tiamaj kursoj ne validas kiel AIS-studado.

La inaugura prelego de Prof. Stepniewski en Karlovo kompreneble ankaŭ ne estis kurso (tiu devas ampleksi minimume 8 lekcihorojn !)

Ankaŭ la Abraham Lincoln Foundation ne estas universitato, kies kursoj estas agnoskeblaj kiel "universitatnivelaĵ".

Senprobleme estus agnoskeblaj atestoj de jenaj institucioj el Tirane:

Akademia e Arteve e Tiranes
Akademia e Larte Ushtarake e Tiranes
Instituti i Larte i Kultures Fizike " Vojo Kushi " i Tiranes Shkolla e
Larte Ushtarake e Bashkuar e Tiranes Universiteti Bujqesor i Tiranes
Universiteti i Tiranes Universiteti Politeknik i Tiranes

Mi povis trovi g^is nun nur 52 studunuojn, el kiuj estis jam uzitaj por la bakalaura ekzameno 40 - restas do 12. Necesaj estas 80

Mi bedaŭras, ke mi ne povas doni pli favoran informon kaj elkore salutas

Dieter Quednau

Prof. Dr. H.D.Quednau Technische Universitaet Muenchen
Am Hochanger 13 Forstwissenschaftliche Fakultaet
DE-85354 Freising Forstliche Biometrie und Informatik
Tel: +49 8161 71-4765
Fax: +49 8161 71-4767
email: quednau@wzw.tum.de
url: <http://www.forst.wzw.tum.de/~quednau>

AGAD-PRINCIPOJ POR KONSULTEJOJ DE INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO (ISTK)

– Klerigejoj de AIS/AKB

Kiu povas organizi konsultejon de ISTK?

1-e Ĉiu organizaĵo, kiu interesiĝas pri kunlaboro kun la Studumo.

2-e Ĉiu instruisto, kiu volas instrui Esperanton.

3-e Ĉiu membro de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo kaj Internacia Klubo „Esperantotur“.

4-e Ĉiu esperantisto, kiu interesiĝas pri turismo kaj kulturo.

Kiu rajtas studi en la konsultejo?

* Ĉiu persono, kiu finis almenau mezgradan lernejon (egalnivelan al liceo en Pollando) kaj akiris atestilon au diplomon pri studad-matureco. Por studi ĉe AIS, necesas esti antaŭe lerninta (bazlernejo +gimnazio +liceo) minimume 12 jarojn.

Kiel procedi por starigi konsultejon?

1-e Varbi enlande minimume kvin dezirantojn kaj kolekti de ili jarajn studkotizojn.

2-e Sendi al ISTK en Bydgoszcz pripersonajn enketilojn de la kandidatoj (en Esperanto), kopiojn de iliaj enlandaj maturec-diplomoj kaj po kvar pasport-fotoj.

3-e El la kolektitaj jaraj studkotizoj transpagi al bankkonto de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo (Bank Pocztowy O/Bydgoszcz, konto n-ro 80 1320 1117 2034 0100 2000 0001 SWIFT kodo POCZPLP4) po 100,00 EUR aŭ US\$ 100,00 por ĉiu studanto – por registrigo, indkso (studlibreto) de ISTK/AIS kaj studkostoj dum la studjarfina sesio en Bydgoszcz.

Kiuj estas la rajtoj kaj devoj de la gvidanto de konsultejo?

1-e La gvidanto mem decidas pri enlande kolektataj studkotizoj kaj event. rabatoj; memoru tamen, ke ili devas sufiĉi por sendi po EUR 100 au US\$ 100,00 al Bydgoszcz kaj por organizi enlandan studadon inter septembro kaj aprilo de la sekva jaro.

2-e La gvidanto mem decidas pri la datoj, horoj kaj lokoj por enlandaj stud-okupoj, mem zorgas pri taŭgaj instruistoj kaj pagas al ili honorariojn. Precizaj temoj de la enlandaj lekcionoj kaj ekzercoj devus esti adaptitaj al la enlandaj kondiĉoj (ekzemple leĝoj pri turismo) kaj bezonoj de la gestudentoj, tamen la ĝenerala temaro kaj distribuo de studhoroj devas konformi al studprogramoj de ISTK/AIS, anoncitaj ĉe www.esperanto-turismo.com.

3-e Fine de ĉiu studjaro, t.e. en aprilo, la gvidanto organizos grupvojaĝon de la gestudentoj al studjarfina internacia sesio de ISTK/AIS en Bydgoszcz – kaj prefere mem gvidos la vojaĝon. La loĝado kaj manĝado dum la restado en Bydgoszcz estas pagendaj aparte (por la gvidanto senpagaj); eblas pagi ilin surloke.

Kiuj estas la rajtoj kaj devoj de la gestudentoj?

1-e Regule partopreni la stud-okupojn kaj subigxi al ekzamenoj okazantaj en la konsultejo. Ĉiuj faritaj kursoj, ekzamenoj kaj praktikoj devas esti atestitaj en studlibreto; krome, sed ne devige, la konsultejo povas atesti ilin per apartaj dokumentoj.

2-e Fine de la studajroj (januaro-aprilo) verki Esperantlingvaj diplom-verkojn kaj prezenti ilin dum la studjarfina sesio. La konkretaj temoj devas esti aprobitaj de la gvidanto de la konsultejo; ĝenerale temas pri:

* en la unua studjaro: mem prilaborita detala programo de internacia ekskurso tra minimume 3 landoj – proksimume 10-20 kolumnoj;

* en la dua studjaro: detala prezento de turismaj kaj kulturaj valoroj de elektita urbo/regiono de la propra lando – sume 10-20 kolumnoj;

** en la tria studjaro: disertacio pri libera temo interkonsentita kun la patrono – t.e. profesoro aŭ docento de AIS, kiu helpas la studenton kaj poste recenzas la verkon (se la studanto ne celas fariĝi bakalaŭro de AIS, patroni povas ankaŭ gvidanto de la konsultejo). La amplekso de la disertacio devas esti 10-30 netaj kolumnoj plus traduko en la gepatran lingvon de la studanto kaj resumo en alia oficiala lingvo de AIS.
Klarigo: unu kolumno (nomata ankaŭ tajppagxo) egalas al 1600-1800 tajpsignoj.*

3-e *Fine de ĉiu studjaro partopreni la studjarfinan sesion de ISTK/AIS en Bydgoszcz, frekventi dum ĝi laŭeble multajn kursojn (precipe tiujn de AIS), prezenti publike sian diplom-verkon kaj subiĝi al ekzamenoj (precipe la studjarfina internacia).*

4-e *Se la studanto, aldone al la fina diplomo de ISTK, aspiras al bakalaŭreco de AIS – li/ŝi devas dum la trijara studado „kolekti” minimume 180 studunuojn, el tio 40 dum kursoj atestitaj de profesoroj aŭ plenrajtaj docentoj de AIS, 10 por la fina disertacio kaj 40 atestitaj de ISTK en Bydgoszcz kaj ceterajn en ties konsultejo. Klarigo: unu studunuo (STU) egalas al minimume 8, maksimume 15 studhoroj po 45 minutoj.*

Ĉu ĉiuj gestudentoj estas samtempe gestudentoj de AIS?

- Ne ĉiuj, sed ĉiuj rajtas esti. Studentigxo ĉe AIS kostas € 32,50 – pagenda kune kun la jara studkotizo. La gestudentoj ricevas studentan legitimilon de AIS, kiu validas gxis la fino de la studado, t.e. gxis bakalaŭrigxo – tamen ne pli longe ol dum kvin jaroj. Surbaze de tiu legitimilo ili rajtas al 80% redukto de kurs- kaj ekzamen-kotizoj de AIS, kondiĉe ke la kursoj kaj ekzamenoj okazas ĉe ISTK en Bydgoszcz au en unu el la tiel nomataj „reformeuropaj” landoj.

Kiajn finajn dokumentojn ricevas la gestudentoj?

- Ĉiujare, surbaze de Esperantlingva diplom-verko kaj internacia ekzameno, du-lingvan (Esperante kaj pole) ateston pri fino de la studjaro kaj akiro de planitaj kvalifikoj. Aldone, je la fino de la tria studjaro, pollingvan diplomon pri fino de post-maturekzamena studumo (oficialan en Pollando) kun indiko pri akirita profesio: specialisto pri organizado kaj disvolvo de turismo au specialisto pri organizado de kulturo (depende de la temo de fina diplom-verko). Tiuj, kiuj estis samtempe gestudentoj de AIS, ricevas ankaŭ apartan diplomon de AIS en la kvin oficialaj lingvoj de AIS: la internacia lingvo (Esperanto), angla, franca, germana kaj itala pri la akiro de la scienca grado „baccalaureatus scientiarum morphologicarum” au „baccalaureatus scientiarum humanarum”. *Pliajn informojn pri AIS legu ĉe: www.ais-sanmarino.org*

Ĉu post la fino de la trijara studado eblas studi plu?

- Jes, se je la fino de la trijara eduk-ciklo la studinto sukcese bakalaŭrigxis ĉe AIS. Ĉe ISTK en Bydgoszcz eblas ankaŭ dujara postbakalaura, magistriga studado kun la celo akiri ĉe AIS la gradon „magister scientiarum morphologicarum” au „magister scientiarum humanarum”; tiucele necesas „kolekti” pliajn 120 studunuojn (sume 60 en kerna fako kaj 60 en unu-du kromfakoj), kaj prezenti magistrigan disertacion kun la amplekso de 40-120 kolumnoj. Poste, rekte ĉe AIS (do ne plu ĉe ISTK en Bydgoszcz), eblas doktoriĝi, kaj fine eĉ habilitiĝi.

Ĉu la konsultejo devas esti enlande registrita?

-Tio dependas de Viaj enlandaj legxoj pri edukado. Se eblas, ni konsilas registri la konsultejon enlande kiel nepublikan lernejon (studejon), ĉar tio permesos al la gestudentoj ricevi ankaŭ atestilojn au diplomojn oficialajn en Via lando.

Prilaborita surbaze de la statuto de ISTK, regularoj pri instruado kaj studado kaj ekzamenregularoj de ISTK kaj AIS

**Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo
Str. M.Sklodowskiej-Curie 10**

PL-85-094 Bydgoszcz, POLLANDO, tel./fax: (48-52)3461151

www.esperanto-turismo.com

e-mail: stud@esperanto-turismo.com

Afis'o de Juna Amiko

J Ju un na a a am mi ik ko o

Nia revuo proponos pli da pa oĵ, por liveri pli bonan servon al ĉiuj el niaj leganto-grupoj:

.Junuloj en grupoj kaj solaj

.Infanoj, interalie el esperantaj familioj

.Komencantoj de ajna a o

.Lernejoj, kursanoj kaj iliaj instruistoj

La presita revuo enhavos signife pli da pa oĵ, kun pli da bildoj, pli bone spacitaj tekstoj, kaj kun

allogaj novaj rubrikoj, kiel ekzemple:

.Interkulturo: La klasoj kaj partoprenantoj de la interkultura lernado regule prezentos sin kaj siajn kontaktojn en la revuo, por ke ĉi iu dividu ilin.

.La kvino-kvizo: Kvizo-folioj pretaj por kopiado al grupo. Lega o kun kvin divers-specaj kviz-ekzercoj. Por iuj ĈE agrablaj ludoj, por aliaj ĈE valora preparado por Esperanto-ekzamenoj.

.Gasto-rubrikoj: Luj prizorgataj de junuloj, kaj el plej diversaj mondpartoj.

Junuloj pli kaj pli aliras lega ojn, instruon kaj amuzon el la interreto. Sekve *Juna amiko*

kunlaboras kun la hejma o de la projekto *Lernu*. Tie aperas tuta sekcio por niaj legantoj:

.Mult-lingva ret-prezento de nia revuo

.Artikoloj, iuj aperintaj, aliaj ne aperontaj en la revuo.

.Ekzercoj, ludoj a materialoj aldone al revuaj eroj.

.Ret-vortaroj, por helpi legantojn kompreni la tekstojn.

.Aliro al reta babilejo de *Lernu* por mesa i kun aliaj legantoj.

.Ret-rubrikoj *Deziras korespondi* kaj *Leteroj al la Redakcio...*

En la presita revuo aperos la adreso per kiu aliri la novajn pa ojn por abonantoj. Ni ĉi iumomente aldonos fre an materialon al la pa aro. Do, kvankam la presita

revuo reiros al apero tri-foje jare (kiel de 1973-1986), per la retejo *Juna amiko* aperos almena

12-foje jare! Ofteco rete, palpeblo revue.

Kotiztabelo

1 ekz. Ekde 3

Tarifo 1 • 14 po • 11

Tarifo 2 • 9 po • 7

Juna amiko: pli da— pli ol— revuo kaj retejo

Ekde 2005

Pli da gazeto

Pli ol gazeto

Por aboni, kontaktu vian landan peranton:

Rigardu: www.ikso.net/filei sub *Juna amiko* a www.lernu.net sub *Juna amiko* en la biblioteko. Nerete: Juna amiko, pf. 193, HU-1368 Hungario.

Raporto de ILEI estraro pri sia budj'eto

Bu g etoj kaj nuna rezulto por Juna amiko 2004-5 (e u roj)

Bu g eto 2005 formulita la u eldonpropono skizita sube.

Bu g eto 2004 Prognozo 2004 Bu g eto 2005

Abonoj plentarifaj (T1) 450 x 8 = 3600 320 x 8 = 2560 320 x 10 = 3200

Abonoj T2 330 x 5 = 1650 310 x 5 = 1550 310 x 7 = 2170

Abonoj regionaj 200 x 3 = 600 170 x 3 = 510 170 x 4 = 600

Donacoj kaj donacabonoj ** ** *

Subvencioj —***—

SUMO DE ENSPEZOJ 5850 4620 6050

Presado (Saluton presejo) (1300 ekz) 2080 (1100 ekz) 1760 (1100 ekz) 2420

Afranko (c efe TNT = G3) 3200 2500 2700

Honorario redaktora * 96 96 108

Honorario ret-pa g o -- -- 80

Honorario rubrikuloj -- -- ***80

Honorario admin + helpantoj * 352 352 352

Materialoj, benzino, cetero 60 20 80

Varbilo, varbado 150 150 200

SUMO DE KOSTOJ 5938 4878 6020

Gajno/Deficito 88 258 30

* € 96 = 24,000 HUF jare. € 352 = 22,000 HUF numere.

** Inkluzivite kun T1.

*** Ni atendas ke la projekto "Interkulturo " liveros 8 pa g ojn de prespreta materialo numere, je siaj

propraj kostoj, a u per propraj honorarioj. Bonvenos kontribuo de Interkulturo kontra u la aliaj kostoj

aperigi ties pa g ojn.

Jaro 2004

Stato Julio. La nombro da abonoj preterpasis la finsumon por 2003. Jen aktuala prognozo pri stato

Proponita antaŭ kelkaj jaroj por la Nobelpremio, aŭtoro de multaj verkoj kaj tradukoj en Esperanto, la skota verkisto William Auld publikigis en 1988 libron sub la titolo "La Fenomeno Esperanto" (eld. UEA, Roterdamo) en kiu li prezentis la ekzistokialon de tiu lingvo kaj la rezultatojn, kiujn ĝi atingis en centjara ekzistado. De tiam la Interreto konsiderinde akcelis la aferon, ĉar montrighas per la retserĉilo Google, ankaŭ uzebla en Esperanto, ke en unu jaro, de post aprilo 2003, la nombro da ttt-adresoj ligitaj al la ŝlosil-vorto "esperanto" transiris de 750 000 ĝis 1,1 kaj 1,26 miliono da adresoj, depende de la landoj, t.e. progreso de 40 ĝis 50%. La Interreto favoras fakte tiun abundon da iniciatoj ĉirkaŭ tiu lingvo pro tio, ke la publiko disponas je aliro al informado, lernado kaj kontroleblecoj, kiuj estis nealireblaj dum ĝia unua jarcento de ekzistado pro pli malpli efike kashita cenzuro. La lingvo malkovrenda ĉi somere (kaj poste) estis celo de rekomendoj de Unesko en 1954, jen kvindek jaroj, kaj 1985. Ĝi vicighas en la deka pozicio inter la kvindek lingvoj en kiuj aperas la libera enciklopedio "Wykipedia" <<http://eo.wikipedia.org/>>. Ĝia eniro en la politika areno en Francio, kun la listo Europo-Demokratio-Esperanto en la europaj balotoj de 2004, estas unu el la multaj premieroj al kiuj oni cheestas jam de kelkaj jaroj, ekzemple la unua elektita deputitino (pola) en la Europa Parlamento, S-ino Malgorzata Handzlik kiu, same kiel ŝia edzo, verkisto, kantisto kaj eldonisto, parolas Esperanton.

La artikolo "Décervelage à l'américaine" de profesoro Herbert I. Schiller, publikigita en Le Monde Diplomatique / Manière de voir <<http://www.monde-diplomatique.fr/1999/08/SCHILLER/12381>> estas nun legebla en Esperanto-traduko dank'al Vilhelmo Lutermano ĉe <<http://eo.monedediplo.com/article906.html>> sub la titolo "Usoneca sencerbigo". Tiu ĉi artikolo meritas vastan diskonigon por ebligi al la mondo eskapi al idiotigo kaj prepari sin al civilizado de la lando, kiu pretendas havi la dian mision civilizati la mondon. Senchese kreskas la demando de tradukoj en Esperanton. Bonvenaj estas helpopropoj. La libertempoj donas la eblecon perfektighi en la tradukarto. Jen estas alia maniero ne morti idioto. Dankon pro pripensoj.

- **Subject: # REGI, TIO ESTAS ANTAUVIDI... KAJ ILI NENION ANTAUVIDIS / GOUVERNER, C'EST PREVOIR... ET ILS N'ONT RIEN PREVU**

En sia hodiaua eldono, Le Monde konfirmas la furiozan angligon de la Europa Komisiono.

Kun motivo de plilarghigo kaj de teknikaj malfacilajhoj, la komisaro Neil Kinnock antaŭenigas la aferon de la angla, unika lingvo de Europo : <http://www.lemonde.fr/web/article/0,1-0@2-3214,36-366863,0.html>

por reagi :

prodi@cec.eu.int (prezidanto)

neil.kinnock@cec.eu.int (komisaro pri administrado)

pascal.lamy@cec.eu.int (iama franca komisaro)

jacques.barrot@cec.eu.int (nova franca komisaro)

viviane.reding@cec.eu.int (komisarino pri kulturo... kiu jam piedtretis Esperanton : vd che www.esperanto-sat >> Dokumentoj)

La aŭtoro de la artikolo de Le Monde : ricard@lemonde.fr

Leteroj de legantoj : @lemonde.fr
opinions

Hierau vespere, France 2 dissendis filmon kiu klare montris ke Roosevelt kaj Eisenhower volis, post la liberigo de Francio, instali tie usonan registaron (same kiel okazas nun en Irako). De Gaulle havis almenaŭ la meriton kontraŭstari al tio. Nuntempe, la du ĉefaj landoj de la reto "Echelon" celas akapari al si ne nur Francion sed la tutan Europon. La politikaj partioj kaj registaroj nenion antaŭvidis kaj nenion rimarkis dum tio preparighis jam de pli ol duonjarcento : Echelon en 1948, Anglo-American Conference Report en 1951... La ideo pri unuighinta Europo estas al ni tre kara, sed tiu ĉi tro kostas al ni : ghi ne estas nia !

Heroldo Komunikas

TURNOSHTONO SUR LA VOJO DE EUROPA UNIO

Post la kampanja tumulto, la franca esperantistaro silentas. Ĉu pro elĉerpigo? La historie rimarkinda baloto por elekti la deputitojn al la Parlamento de Europa Unio entenis sep listojn de la "partio" Europo-Demokratio-Esperanto (EDE), kiuj kovris la tuton de la franca metropola teritorio. Unuavide la rikolto magras, ĉie la procentoj ne atingas 0,5, krom du esceptoj. Tamen la legado de la rezultoj ne donas saman bildon, se oni rigardas la sep superregionojn difinitajn por tiu baloto, au la 22 administrajn regionojn, au kelkajn apartajn urbojn. El la superregionoj, la elstara montrighas la Orienta, kun 0,24 %, kaj ene de ghi Elzaco supreniris al 0,31%. Kvankam ne ankoraŭ konataj kaj

analizitaj la streboj kaj klopodoj de chiu EDE-listo, oni povas konjekti, ke tie refalis la efiko de la jhus okazinta "Europa Bunto" (Vd. HdE 2054), pri kiu la loka gazetaro amplekse kaj pozitive raportis. Che la alia fino de la vico, oni trovas la Nordan superregionon, kun zorgige malalta rezulto: 0,03%. Tie plej forte ludis la influo de UFE, la landa asocio de UEA, kies prezidanto norddevena voĉdonigis che la Komitato en septembro 2002 rezolucion kontraŭ la projekto EDE. Ne nur en la UEA-medio, cetere, sed ankaŭ en tiu de SAT la iniciato estis kontrastata. Che ambau tio montris nekomprenon pri la evoluo de la socio, trans la skemoj de la partia framo kun ĝenerala lobiado ĉiudirekten, kaj pli proksime al la "herboradika", civitanara iniciato. Tamen, pli ol la portempa kampanjo, pli ol la interesaj artikoloj, pli ol la apogo de E-istaj instancoj, la baza helpo al la baloto venis de la enradikigho de Eo, de la nombro da E-istoj (ech se kelkaj politike engagitaj ne perfidis sian partion), de la nombro da subtenantaj simpatiantoj, de la nombro da bone informitaj voĉdonantoj, kiuj jam ekkonsciis pri la lingva problemo de EU. Kiam la kritikantoj denunciis la emon de la francaj E-istoj uzi la baloton por propagandaj celoj, ili parte pravis. Fakte la televidaj oficialaj anoncoj donis novan impulson al la tuta franca E-movado. Sed ili ne vidis, ke EDE kapablis produkti originalan programon, substrekante la nunajn malfortajn flankojn de la Europa konstruado: la manko de efektiva partoprenado de la bazaj civitanoj, kaj sekve la troa distanco inter ili kaj la decidpovaj strukturoj. Eksteraj observantoj rimarkis kun miro, ke eblas konduki ĝhisfine balotan kampanjon sen la subteno de politika partio. Jes eblas, dank' al la reta organizado de la surlokaj fortoj, kaj al iliaj konvinkoj kaj sindonemo. Fine rigardu ni du lokajn rezultojn. Saint-Brieuc (Bretonio), la urbo de la ĉefkandidato de la Okcidenta regiono, Denis-Serge Clopeau, atingis la rekordon: 0,77%; kaj Romans-sur Isère (Rodan-Alpoj) Sud-Oriento, kiu NE estas la urbo de la ĉefkandidato kaj kreinto de la projekto, Kristian Garino, ricevis 0,56%. Oni povas veti, ke tie Eo ja bone enradikighis. La sekvoj de tiu nekutima evento antaŭvideblas en pluraj direktoj. Krom la malfortigo de la lobia agado de UFE che preskaŭ ĉiuj politikaj partioj, restos netakseble altvalora sperto, kiu certe utilos por la venonta baloto post 5 jaroj, kondiĉe ke la ontaj EDE-kandidatoj ne lasu la nunajn rezultojn malkuraghi ilin. Kaj eble aliaj landoj en EU, kie Eo multe pli viglas ol en Francio, ampleksigos la strebon de respondecaj civitanoj porti Eon for de la hobia sfero. De nun al 2009, fluos la tempo, la europaj riveroj kaj la malfacilajhoj. Ek al la laboro!

(Marie-France Conde Rey, 2004 06 16)

Novajhoj de AVE

Karaj geamikoj,
 intertempe mi forsendis preskaŭ ĉiujn Avenojn - #27/ 28; kelkajn ekster-europajn mi kunportos al Pekino. Se vi ne ricevis la novan Avenon, bonvolu sin turni al mi. Belan someron/ vintron (al la suduloj) al ĉiuj. Mi esperas renkonti kelkajn el vi; aliaj renkontigxos sen mi, kaj aliaj ne havos la eblecon renkontigxi en kadre de AVE.
 Temo: Socialaj Framokondicxoj, Konfliktreduktado / kunlabori en NRO aux en partio ?
 organiza respondeco: Oxana Burkina 2004-07-24/31* UK (Pekino),

Temo: Verda Politiko: Ekologio, Paco, Homaj kaj Bestaj Rajtoj organiza respondeco: Manfred Westermayer 2004-08-08* KES, La Chaux de Fonds (CH), cxef-temo: Feminismo

Temo: "Gxendra Politiko de la Verdaj Partioj" organiza respondeco Marie-France Conde Rey 2004-08-15 kaj 20 SAT (Bratislava),

Temo (15a): ekologiisma frakcio: Tutmondigxo sub verdaj framokondicxoj Temo (20a): AVE: Tatjana montros filmon pri ekologia ekskurso sur la Dnjestro Rivero organiza respondeco: Tatjana Auderskaya 2004-08-25/29* EEU, Bilbao (ES)

Temo: Verdaj Partioj en la EU - rilatoj al Esperanto
organizas: Wolfgang Gunther

Dankoj

From: Wu Guojiang [amikeco999@21cn.com]

Sent: Wednesday, June 16, 2004 4:16 PM

Koran dankon pro via Bulteno.

Chi kune mi sendas al vi n-ro.2(9) Informilo de Ghemelaj Urboj. Amike Wu Guojiang

Sciigo de Johan Derks

Estimataj estraranoj de landaj asocioj en Europaj landoj, kiuj ne membras European Union au jhus membrighis,

Je la 29a de aprilo mi dissendis jenan mesaghon:

Estimataj redaktoroj,
Esperanto-Societo <Teslic> el urbo Teslic (EST, Bosnio kaj Hercegovino), kunlabore kun Europa Esperanto-Unio, organizos en venonta oktobro tritagan seminarion en Banja Vrucica apud Teslic sub la nomo TAMEN (Teslica Alvoko Movighi al Europa Nacieco). Ghi estas destinita al junuloj kaj junaj mezaghuloj (ghis 40 jaroj) el Kroatujo, Bosnio kaj Hercegovino, Serbio kaj Montenegro, Makedonio kaj Albanujo.
La programo enhavos interalie:
a.. Interkonatigho kaj individua perspektivo
b.. Kion ni atendas de Europa Unio ?
c.. La kulturo de niaj najbaroj kaj regionoj
d.. Organiziteco de EU
e.. Chu ni perdos nian suverenecon ?

Alveno je jhaudo, 7 de oktobro, en la bankuveja loko Banja Vrucica, hotelo "Kardijal" (3 km de Teslic). Foriro je dimancho, la 10a. Kostoj de partopreno: 25 BAM (1 BAM = 0,51 euro). Viaj vojaghkostoj estos duone rembursitaj.

Petu alighilon de EST, radolinka BB, BA-74270 Teslic, Resp. Sernba - Bosnio kaj Hercegovino, Tel+fakso : +387-53 436-572 au rete tra est@teol.net .

La seminarion subvencias la nederlanda pacmovado IKV kaj Europa

Esperanto-Unio. Prepare al TAMEN ili invitas chiujn Europajn gejunulojn en landoj, kiuj ne estas membroj de Europa Unio au kiuj jhus alighis, doni sian opinion en eseo au 'kolumno' de minimume 200 kaj maksimume 500 vortoj, rilate al sekvaj demandoj :

La plivastigo de Europa Unio je la 1a de majo per dek novaj membro-shtatoj estas grava nova pasho en la procezo de Europa integrigho. Sed kun tio la procedo ankoraŭ ne finighis! Bulgarujo kaj Rumanujo sin preparas por la membreco kaj ankau la landoj de okcidenta Balkanio vidas sian estontecon - baldau au malpli baldau - ene de EU.

En lando kia Nederlando la interesigho pri centreuropaj kaj orient-Europaj landoj en penigaj transformighoj nun estas konsiderinde malpli granda ol antau dek jaroj. La atento nun direktighas al enlandaj problemoj, al Irakujo, Meza Oriento kaj la batalo kontraŭ teroristoj. IKV deziras, dum la monatoj en kiuj Nederlando prezidas European Union (julio ghis decembro inkluzive) emfaze meti en la tagordon kelkajn aferojn, inter kiuj la problemon de ekonomia kaj socia integrigho de landoj, kiuj suferis multe en la transforma procezo.

Tial IKV bezonas vian kontribuadon! IKV ankau volas auskultigi vian vochon en la debato. Tial ni invitas vin komenti al jenaj du tezoj:

1. Mia lando ja (devas alighi/ prave alighis) al Europa Unio, sed (sekvas konsiderado kiel via lando profitos au malprofitos de EU-membreco).
2. Mia lando (devas alighi/ prave alighis) al Europa Unio, char (sekvas konsiderado kiel EU profitos de membreco de via lando).

Kompreneble povas eniri multaj temoj: ekonomia evoluado, politika stabileco, kultura richigho, socia novigado, pli da eblecoj por Europo en la mondo, ktp.

Sendu vian kontribuon antau la 1a de septembro al Johan Derks, Rietgors 40, 8271 GH IJsselmuiden, Nederlando.

Al la ensendintoj kelkaj interesaj esperantaj libroj estos lotumataj. Menciŭ kiun libron vi shatus ricevi (ne pli ol 20 eŭroj), se vi gajnos.

Bonvolu kontroli, chu tiu gazetarnovajho jam aperis en via nacia bulteno (se tia ekzistas) kaj sciigi al mi, chu jes au ne, prizorgante la plej baldauan publikigadon, se ne.

Aktuale la organiza komitato serchadas prelegontojn pri la temoj, menciitaj supre. Certe ekzistas pluraj profesiuloj, kiujn ni povas inviti, sed ili gnerale ne parolas esperanton. Se vi volas proponi iun, bonvolu sciigi al est@teol.net kaj al mi.

Bonvolu kompreni, ke tiu-chi seminario eble estas la unua (de esperantistoj) en Balkanio, kiu klareprime adresighas al anoj de akre militintaj etnoj por mediti pri ilia (komuna ?) estonto. Ghia sukceso indikos, ke esperantistoj pretas realigi inter si ioman sanktan harmonion, kiun alia grava orient-europano predikis antau cent jaroj.

Sincere via,

Johan Derks

Humoraj'oj

Anekdotoj kun Nastradino

Kian intereson g'i prezentas por mi?

Nastradino sidis c'e la pordo de sia hejmo por iomete fres'ig'i. Kontraŭ li sidis la najbaro, farante la samon. Subite la najbaro lau'tvoc'e diras:

- Nastradin, rigardu tiun viron portanta paton kun rostita anaso sur g'i.
- Tio ne interesas nin-respondas Nastradin.
- Oh li estas alvenante al via hejmo.
- Tio ne interesas vin!

Mi estas sekigante la farunon sur tolaj'-s'nuro

- Nastradin, pruntedonu al mi la tolaj's'nuron, c'ar mia edzino bezonas g'in.
- Oh , vi estas malbons'anca, mi j'us estas sekigante farunon sur g'in.
- Neeble, la faruno ne sekig'as sur la s'nuro..
- Vi estas stultulo, kiam iu ne deziras prunedoni ion al kelkiu li inventas iun ajn kialon..

Kiu estas ja plej utila

- Nastradin vi estas la plej sag'a el ni, diru al mi kiu estas pli utila, Suno au' Luno?
- Luno –respondas Nastradin.
- Kial do?
- C'ar la Suno estas idioto brilanta tage kiam oni ne bezonas tion..

• Malavarulo

Iutage Mustafa, la plej ric'a vilag'ano, estis dronante en la riveron. C'iuuj homoj kuris al li kaj etendis sian manon dirante “donu al mi la manon, donu la manon, Mustafa. Sed Mustafa tute ne reagis. Venis al li Nastradin kaj diris:- Prenu mian manon Mustafa, prenu mian manon. Tiam Mustafa tuje kaptis la manon de Nastradin kaj savis sin.

EZOPO (tradukite kaj reverkrite de K. Kalocsay)

Libero

Liberon plenan g'uis iam la c'eval',
lau'plac'e kuradis en la kampo, tra la val'.

Alvenis foje kaj ofendis g'in la cerv'
Per malklarigo de fonto kaj hufreto de herb'.

G'i volis veng'i, sed kun pli rapida sving'
La cervo kuris: g'i fiaskis pri l'ating'.

Kolero en g'i bolis, kaj g'i , en impet'
Nun al la homo turnis sin kun helpo-pet'.

C'i tiu diris: “Bone, la cervon c'asos mi,
se bridon, selon al vi meti lasos vi”.

La cervon murdis la c'asist' per lancotraf',
sed la c'eval' por c'iam ig'is lia sklav'.

La ranoj volas reg'on..

La tutan marc'on havis por si la rana gent'.
Libere ili vivis, tamen sen kontent'.

Jupitron ili tedis per petega preg'
Por la ricevo de moral-firmiga reg'.

Jupitro , ride, s'tipon j'etis el la alt'.
Kun ega plau'do g'i falis. Hu! Per tima salt'

Rifug'is nun de sia reg'o la popol'.
Kaj longe kas'is sin sub dika marc'tavol'.

Els'ovis fine la kapon tamen unu ran',
Rigardis, ke la reg'o terura estas s'tip'.

Sen timo venis tuj vetnag'e la tuta trib',
sursaltis ili la s'tipon au' surrampis g'in,
ec', malhonore per sia koto stampis g'in.

Kaj ili Jupitron petis nun pri nova reg'.
Anstatau' la sentaug'a, c'ar senpova reg'.

Nu, venis nova reg'o, sed estis , ve, serpent',
komencis ilin ekstermi per venena dent'.
Nenie savo! Morta silento kaj terur'!

Sekrete ili petis, pere de Merkur',
Jupitron , helpi. Sed li sen kompat':
"Ne plac'is bona, plac'u la malbona stat'!"

Inter du malbonoj

Buc'isto kaj pas'tisto voje pasis.
Jen , ili s'afon, kiu bele grasis,
ekvidis vagi sur la kamp' senmastre,

alkuris, kaj tuj ekkverelis draste,
al kiu apartenu la trovito.

Post longa disputado kaj ekscito,
c'ar tiutempe c'iu best' parolis
ankorau' homalingve, ili volis,
ke mem la s'af' decidu pri c'i tio.

Tiu demandis ilin pri l' metio,
Kaj, kiam la respondojn g'i akiris,
al la pas'tisto g'i ekg'eme diris:

“Nu, mi starig'as do sur vian flankon,
prefere doni lanon ol la sangon.”

El la diplolaboraj'oj de niaj studentoj

Albanio rigardata de tri ties urboj-Resumo

Por ekkoni unu landon kaj ties popolon ekzistas diversaj manieroj: oni povas trafolumi literaturon pri ties geografio, historio kaj aktualeco. Oni povas viziti g'in persone, ec' oni povas kunvivi en la sino de ties popolo dum certa tempo.

Tiel agis multaj personecoj el la scienca, politika, kultura kaj religia mondoj pasintece kaj hodiau'. Menciendas la jena fakto: demandite pri Albanio la eksa futbala brazila stelo Pele, poste ministro pri kulturo kaj sportoj en unu el labrazilaj s'tatoj, donis pli malpli jenan respondon “mi ne estis persone iamfoje en Albanio, sed mi bons'ancis legi kaj au'di pri g'i. Tiel mi eklernis io pri la fama dramaktoro Aleksander moisiu, ludanta antau' la Dua Mondamilito; samtiel mi legis ion el la verkoj de la nuntempa verkisto Ismail Kadare kaj sendube mi au'dis multon pri la bonfaraj aktivecoj de Patrino tereza. C'iuuj c'i tiuj tri presonecoj estas ja albanaj kaj lau' mia opinio, ili suffic'as por konkludi ke albanoj reprezentas grandan kaj mirindan popolon”.

Sciuloj kiel Lajbnico, voĵag'emuloj kiel Evliha C'elebi, poetoj kiel Bajron, ka estas postlasintaj multajn skribaj'ojn pri albanoj kaj ties kulturo, unuavice pri la albana lingvo, kiu estimig'as kiel la plej malnova en Eu'ropo, pri moroj kaj kutimoj pratempaj kaj noblaj, pri batalema kaj liberecama spirito de albanoj.

Envere, albanoj, c'i tiuj posteuloj de iliroj, estis c'iam en la teroj kie ili log'as hodiau', ec' pli vaste, ekde Bavario g'is malsupre en Çamerio (C'amerio) kaj Golfo de Ambrakio en Grekio; ekde Apenina Duoninsulo g'is la rivero Vardar en Makedonio. Ili havis iamtempe iliajn potencajn s'tatojn kiel tiu de Ardianoj, de Enkelejoj, Taulantoj, Kaonoj, Epiranoj ks kiuj kunfrontig'is sukcese dum longa tempo al la armeoj de romia kaj otomana imperioj, dum pli malfrue estis c'efaj kolonoj de lastaj imperioj kaj helpis notinde por plilongigi la vivon de c'i tiuj lastaj. Suffic'as mencii ke estas ja dekoj la iliraj imperiestroj romiaj kiel ekz. Granda Kostandino kiu dekretis kristanisman kiel s'tata religio, Diokleciano kiu donis fortan antau'empus'on al la disvolvig'o de agrikulturo kaj ekonomio, Granda Justiniano kiu starigis la bazojn de tiel nomata Romia Justo.

Samtiel estas dekoj kaj centoj la veziroj, pas'aoj, sciuloj kaj eminentaj majstroj de otomana imperio, je albana deveno, kiel Sami Frasheri, au'toro de la granda vortaro kaj enciklopedio turka, Hoxha Tahsin, rektoro de la unua turka universitato, Mehmet Ali kaj ties dinastio kiu regis en Egiptio dum pli ol centjaro, Ali Pashe Tepelena kaj Bus'atlioĵ fondintaj s'tatojn preskau' sendependentaj de Sultano dum dekoj da jaroj.

Sendube, la plej brila tempoperiodo en la historio de porlibera milito de albanoj estas tiu de Gjergj Kastrioti- Skanderbeg legendeca, kiu malhelpis la otomanan s'tormon dum 25 jaroj trafi la Okcidentan Eu'ropon.

Kontrahite en iliaj aktualaj teroj, maljuste disdividite en kelkaj s'tatoj fare de decidoj de Grandaj Potencoj (En Albanio, Kosovo, Makedonio, Grekio kaj Montenegro) por komplezi la s'ovinizmajn najbarojn slavo-grekajn, albanoj pasigis ankoraŭ kelkdekoj da jaroj sub la plej sovag'aj diktaturoj de XX jarcento, por eliri en la liberon nur post la jaro 1990, sed terure malric'aj en ege malforta s'tato.

Hodiaŭ ili aspiras aligi al progresema Eŭropo en c'iuaj aspektoj, sed por akiri tion ili devas atendi ankoraŭ multajn jarojn.

Por kompreni, do, albanojn, ilian pasinton kaj nuntempon, mi pensis analizi la vivon kaj karakterizaj'ojn de nur tri urboj: Shkoder norde, Kruja centre kaj Berat sude de la lando, pli g'uste de la sendependa albana s'tato. Kial do?

Unue, c'iaj tri urboj havas geografian kaj historian apartan pozicion, je tioma grado kiom por ke oni ekkonu Albanion, la vizitanto devas nepre ekvidi kaj ekstudi ilin. Tri urboj estas ege pratempaj, ne kelkjarcentaj, kiel ekz. Tirana aŭ Was'ingtono, sed miljaraj. Por Berat kutime oni diras "urbo 2400 jarag'a!" Samtiel oni diras pri Shkoder kaj je ia grado ankoraŭ por Kruja.

Shkoder estas konservinta kontinue g'ian majestecon kiel administra, politika, kultura, komerca kaj ekonomia centro. Sufic'as mencii ke en XIX jarcento tie estis pli ol 2000 butikoj (kie oni produktis kaj vendis samtempe). Samtiel en Berat. En Shkoder estis la sidejoj de Ardianaj reg'oj, famaj Agron, Teuta, Gent. Tie estis la centro de granda pas'aolando de Bus'atlio dum XVIII-XIX jarcentoj. Tial Shkoder estis ege avidita de montenegranaj najbaroj, kiuj plurfoje tentis ekokupi g'in sensukcese. Dum la komencig'oj de XX jarcento Shkoder estis ja sendube la plej grava urbo de Albanio. Tial tie estis starigitaj ankoraŭ la sidejoj de kelkaj gravaj fremdlandaj konsulejoj kiel tiu de Italio, Aŭstro-Hungario, Britio, Rusio, ke kie oni ludis c'iuajn diplomaciajn kaj politikajn kartojn. S'erce oni mencias Shkoder kiel urbo de la Granda Preg'ejo (katolika katedralo), Granda kafejo, Granda Kastelo, ks. Tie estas harmonie interplektitaj albanaj log'antaroj de tri religiaj konfesioj: muslima, katolika kaj ortodoksa. Shkoder estis c'iamtempe lulilo de okcidenta civilizacio por albanoj. Dum la komunista diktaturo Shkoder estis granda centro de rezistado kaj demokratio. Neniu s'tatpotenco ne sukcesis kompromiti kaj konfuzigi la popolon de tiu urbo, kiu prikonsideris kaj estimis unuavice la justecon, nacian intereson, civitanan bravecon.

Berat sude estis brilanta dum la antaŭromia tempo c'ar g'ia estas lokita en la koro de prospera areo, Myzeqea (Muzekeo). G'iaj iliraj kasteloj kaj fortifikaj'oj estis dum longa tempo ne subigeblaj de romiaj legioj, kiuj finfine detruis ilin murdante samtempe la civilan log'antaron. Postsekvis longa tempoperiodo je dezertig'o, sed dum la otomana imperio la urbo reakiris sian brilon kaj gravecon. La fremdaj voĵag'emuloj g'in vizitintaj, restis ravitaj pro beleco de domoj kaj karakterizaj kvartaloj, granda nombro de objektoj de kulto, sennombraj butikoj kaj granda komerco tie disvolvig'inta. En Berat atingig'is alta skalo de civilizacio por la tempo, sin espriminta en la kultura kaj artisma vivo g'ia. Ene de g'ia kastelo ankoraŭ konservig'as pli ol 44 ortodoksaj malgrandaj preg'ejoj, muzeo de ikonoj, tre rara pro g'ia kvalito kaj valoroj, valoregaj relikvaj'oj, ks. Aktuale g'ia estas proklamita urbo-muzeo sed same monda ric'aj'o sub la protekto de Unesco. En la sino de la kastelo oni okazigas festivalojn kaj aliaj gravajn kulturajn aktivecojn naci kaj internaciskale.

Kruja estas historia urbo por albanoj c'ar en XV jarcento tie estis la sidejo de granda kapitano Gjergj Kastrioti- Skanderbeg. Reveninta el la ekzilo je 28 an de novembro 1443

Skanderbeg imediate sukcesis organizi kaj unuigi la albanojn por rezisti al la otomanaj hordeoj kiuj komencis alvenadi unu post la alia je centmiloj. Sed g'uste antaŭ la muregoj de la kastelo starigita sur strategia pozicio fiaskis tri grandaj sieg'oj gviditaj de distingitaj sultanoj Murato kaj Mehmeto. La falo de Kruja en 1478 jaro notis ankau' ties ruinig'on sed ankau' la translokig'on de plejparto de civila log'antaro, c'efe en Apeninan Duoninsulon, kie ankoraŭ log'as ties posteuloj - arbres'oj. En Kruja postrestis tre malmulte el la iama kastelo, el la urbeto ene de g'i, objektoj de kulto, bazaro mezepoka, sed tamen ili sufc'as por ekkoni la ric'an popolan kulturon samkiel la militemajn tradiciojn. Tial Kruja estas proklamita urbo-heroo. La urbo havas log'antaron c'efe je muslima konfesio , de sekto Bektas'i. Sur la monto apude estas katolika preg'ejo proksime de sankta loko kie arig'as c'iuare centmiloj da kreduloj.

Tiel analizinte nur c'i tiujn tri urbojn, kiu ajn lokulo au' fremdulo povas krei tablon pri albanoj, ilia historio, kulturo kaj ric'aj tradicioj. Vizitante ties karakterizajn objektojn, kiel domojn, muezojn, preg'ejojn kaj moskeojn, bazarojn kaj kastelojn, vi povas akiri ideon pri la situacio en Albanio g'enerale. Tiel ekz. la karakterizaj domoj de Berat multe similas al tiuj de Gjirokaster , pli sude, kaj Prizereno en Kosovo; bazaro de Kruja havas komunajn ecojn kun bazaro (c'ars'io) de Gjakovo en Kosovo; kastelo de Shkoder estas majesta samkiel tiu de Gjirokaster , Berat kaj kie ajn en Albanio.

En tri urboj vi trovos similaj'ojn, naciajn kostumojn kaj folkloron je komunaj ecoj tatalbanaj.

Nature, malric'a s'tato de Albanio ankoraŭ ne povas fari multon por bone tenadi kaj restau'rigi kaj plipotencigi pluen c'iuajn kulturajn monumentojn kiuj ankoraŭ ekzistas ec' parte en c'i tiuj urboj kaj ceteraj de Albanio. Tio estas nunpurn vera malfelic'aj'o. Ni rememoru ekz. la alarmigajn alvokojn transdonitaj pere de preso kaj medio nia pri karakterizaj domoj detruig'antaj en Shkoder (kiel estis kazo de domo de patrioto Luigj Gurakuqi), en Gjirokaster (domo de Kadarej) kaj aliloke, pri kastelaj muregoj falig'antaj pro erozio kiel en Kruja, ks.

Sendube unu el objektivoj de c'iu albana registaro, de neregistaraj organizaj'oj kaj popolaj komunumoj entute estos ankau' la konservig'o kaj plifortig'o de c'iuaj objektoj, kulturaj kaj historiaj monumentoj g'enerale en la lando, c'ar tiamaniere oni servas al la nuntempo, al la edukig'o de homoj sed ankau' al nia nacio kaj s'tato en internacia areno, c'ar tiuj monumentoj, tradicioj kaj multenombraj karakterizaj'oj estas ja la spegulo de nia nacia identeco.

Elton Zaimi

Albanaj tradicioj

Sag'aj vortoj el la Albana-Homaj karakterizaj'oj

Ai që premtun , bën pak (Shkodër)- La multon promesanto, malmulton faranto. (Shkodër)

As kullon , as turbullon (Dibër)- Nek filtrigas, nek perturbigas. (Dibër)

Atë po e pështyjnë në turi, ai thotë po bie shi (Jug)- Oni lin krac'as sur la vizag'on, li diras ke fakte pluvas (Sudo)

Atë s'e qasin në fshat, ai kërkon të bijën e priftit. (Jug)- Lin oni ne permesas eniri la vilag'on, tamen li postulas svati por si la pastran filinon. (Sudo)

Bën hesape pa hanxhinë (Gjirokastër)- Li kalkulas sen la gastejac'estro. (Gjirokastër)

Bëni si them unë, mos bëni si them unë (Kosovë)- Faru tiel kiel mi diras , ne faru tiel kiel mi faras. (Kosovo).

Do shes pras te prasaxhiu (Elbasan)- Mi vendos poreon al la poreovendisto. (Elbasan)

Duarlarë e barktharë (Jug)- Manlavite kaj malsate (Sude)

Dhi e zgjebur bisht përpjetë (Kosovë)- Kaprinac'o kun la hvosto supren. (Kosovo)

E shpie në dyzetë çesme e s'e le të pijë ujë (Kosovë)- Kondukas vin al kvardek akvofontoj kaj ne lasas vin trinki.(Kosovo)

Gojën behar, barkun hambar (Elbasan)- Bus'e kiel en somero, ventre kiel en grenejo (Elbasan)

Gjëmon voza që s'ka verë (Jug)- Tondras la barilo sen vino. (Sudo)

Hem gurin, hem arrën e ka në dorë (Dibër)- Kaj la s'tono kaj la juglando estas en lia mano (Dibër)

Hedh krypë në gjellë të botës (Gjirokastër)- Envers'i salon en alies mang'aj'on (Gjirokastër)

I rri punës si voji përmbi uthull (Shkodër)- Stari c'e la laboro kiel la oleo sur la ac'etato (Shkodër)

I shtrënjtë në krunde, i lirë në miell (Gjirokastër)- Kara je branoj , malkara je faruno. (Gjirokastër)

Ka frikë nga hija e tij (Jug)- Li timas sian ombron (Sudo)

Kryet thi e mëndjen fmi (Kosovë)- La kapo kiel la porko sed la menso kiel la infano. (Kosovo)

E la odën me pleh e fshin oborin (Jug)- Forlasis la c'ambron kun sterko kaj balaas la korton (Sudo)

Me njanën dorë të ep, me tjetrën të merr (Elbasan)- Per unu mano li donas , per la alia ricevas (Elbasan)

Nuk shet qoshja sa shet qosja (Jug)- Ne vendas ja la anguleto kiom vendas la kalvulo.

Njeri që hahet me rrobat e veta (Jug)- Homo kiu kverelig'as kun siaj vestoj (Sudo)

Rob i pamësuem, dru i papërpunuar (Jug)- Ne edukita homo similas al ne ellaborita ligno (Sudo)

Sytë për të parë, mendja për të ndarë (Jug)- La okuloj estas por vidi, la menso por dividi (Sudo)

Shka ndien zemra, atje shkon mendja (Shkodër)- Tion kiun sentas la koro, tien iras la menso. (Shkodër)

Truri mendon e gjuha vepron (Veri)- La cerbo pensas kaj la lango agas. (Nordo).

Eroj el la albana popolmedicino

Ec' nuntempe la scienca medicino aprecas la formulojn de la popolmedicino, bazitajn sur kontrolitan kaj pruvitan uzadon de la primara materio je deveno precipe el lokaj flau'ro kaj fau'no. Oni povas konvinke aserti ke en la tuta mondo la popolmedicino estis kaj

dau're estas la c'efa fonto por malkovri la novajn kaj efikajn medikamentojn de la scienca medicino.

En la libro de s-roj Rexhep Dizdari kaj Hysni Ndoja el urbo Shkoder, Albanio je titolo "Donitaj'oj el la popolmedicino de Norda Albanio", eldonita en la jaro 1975, oni pritraktas 30 malsangrupojn kun pli ol 150 diversaj indikoj, por kiuj estas priskribitaj 1150 kuracmetodoj, estas uzitaj 160 medicinaj herboj, 24 plantaj, bestaj kaj mineralaj produktoj kaj 16 reprezentantoj el nia medicina fau'no.

En la urbo de Shkoder g'is la dua duono de XVIII jarcento ja ne ekzistis kuracistoj kaj apotekistoj, helpe de kiuj la popolo povus ricevi kuracilojn kaj kuracmetodojn. Do, g'is tiamtempe la kuracilojn preparis mem la popolo.

La G'enerala popola milit-h'irurgio

a) Memhelpo

Por kontuzioj trafintaj la militiston pro frapoj per fortaj objektoj, oni surmetis sur la lokon frapitan, metalan moneron au' alian metalan objekton ebenan kiel razilon, kiu akompanis c'iun masklan plenkreskulon, au' ligis g'in per tuko malsekigita per malvarma akvo, au' per salo kaj cepo.

La malprofundajn vundojn la domag'ito s'miris per sia salivo, per salo kaj sukero, kaj je ties manko, oni surmetis bulon da raspita tabako.

En kazoj de vundoj kau'zitaj de malvarmaj armiloj au' de veraj armiloj, la memhelpo konsistis el jenaj agoj:

1. Por haltigi la sangofluon el la vundo, kiam g'i estis sur korpomembroj, oni ligis strikte la domag'itan lokon per rimeno au' forta c'ifono eltranc'ita de vesto.
2. Por malhelpi la inflamon kaj por haltigi la sangofluon oni surmetis sur la vundon raspitan detale tabakon.
3. Por purigi la vundon kaj malhelpi al ties malpurig'o, la vundo akvig'is per urino (pisaj'o) au' per forta alkoolaj'o (vodka, ekz), se disponeble.
4. Por blindaj vundoj pro la armiloj por elmeti la kuglon oni tentis per bus'a absorbo. Tio kau'zis pli fortan sangofluon, sed ofte kronig'is sukcese kaj la kaptita kuglo per dentoj elig'is (nature kiam la vundo estis malprofunda). La ligo de la vundo estis tre necesa kaj estig'is per c'emizc'ifono.

b) Reciproka helpo

Tio certig'is de pli proksima kunbatalanto kiam mem la domag'ito ne kapablis fari tion mem, pro grava sanstato sia au' pro fakto ke la loko estis ne atingebla de li mem. C'ikaze oni ripetis la samajn agoj priskribitaj supre.

La transportado de la vundito de la batalkampoj al la plej proksima hejmo au' al la hejmo de popolkuracisto estig'si de lia kamaradoj lau'okaze, per diversaj manieroj kaj metodoj. Oni uzis tabulon au' brankardon, improvizitajn samkiel la ponc'on.

Medicina popola helpo

En kazo de kontuzioj

La popolkuracisto s'miris la kontuzitan lokon per raki (vodka) au' vinagro kie antaue estis solvita mang'a salo. Kiam la domag'ita loko estis vultua, sur g'in oni metis premitan cepon per salo kiu ligig'is kaj tenatis tiel kelkaj horojn.

Por purigi la incizitajn vundojn (vulnus incisum) la kuracisto uzis raki (vodka) au' fortan vinagron por haltigi la inflamig'on kaj surmetis detranc'itan tabakon por haltigi la sangofluon. En kelkaj kazoj oni uzis farunon kiel kafon, pretigita de bakig'o kaj muleig'o de speco de fazeolo (blinda fazeolo- dolichos) samkiel pulvoron el maizaj tufoj (Zea mays). C'i lastajn por haltigi la sangofluon.

Por la distranc'itaj vundoj (vulnus lacero-contusum), krom rimedojn kiel por la tranc'itaj vundoj, oni uzis malsekigitan fres'an fromag'on , sensala, kaj surmetis maldikan abelan vakson por haltigi la sangofluon. En kelkaj areoj, tiucele estis uzata la surmeto de fumigita viando, premita kiel flanon kaj knedita per forta raki (vodka). Post kiam la sangofluo c'esis, la vundo lavig'is per fraksena akvo (Fraxinus excelsior). Post tiu proceduro, oni faris ligon per malsekigita tukpeco per olivolio, bruligita au' per abelvaksa pastofolio. Pli postajn tagojn, se la kuracisto ne konstatis signojn de inflamig'o, la vundo envolvig'is per filtrilo fortigita per miksaĵ'o de olivo au' lino kun abela vakso. La malsekig'o de la tukpeco estig'is en ujon kie tiuj c'i materioj estis miksitaj je egala proporcio kaj varmigataj sur fajro. La tukpeco je formo de bandag'o, post kiam estis sufic'e satigita per la c'i supra miksaĵ'o, elig'is de tie kaj kus'is dum kurta tempo por malvarmig'i en pura c'ambro. Post tio, g'i fortig'is per pluvmantelo kaj tiastate uzatis por ligi la supre menciitajn vundojn.

En kazoj kiam ka karno domag'ig'is sen eksteraj au' malfermitaj vundoj , la popolkuracistoj estis uzinta la ajlan pajlon. Tiu c'i bone bolig'is g'is kiam g'i plene molig'is kaj je formo de dika supo surmetig'is sur domag'itan lokon. Tio ripetig'is kelkfoje. Anstataŭ la ajlon, oni uzis ankau' la dikan supon el kukurbo erigita per raspilo kaj miksitaj per kulero da sukero.

La prevento de tetano (tetanus)

La mikrobo de tetano troviĝas en la tero, inter rubaĵ'oj kaj en rustigitaj metalaj objektoj. G'i penetras en nian korpon tra vundoj kaj vundetoj de manoj kaj piedoj ec' kiam ne sangofluas el ili. G'i aperas per temperaturo kaj glaciig'o de makzeloj kaj kolo.

Kiam okazis tranc'aj'oj, je iom da profundeco au' pikaj'oj per rustigitaj najloj, la vundito eluis la vundon per raki (vodka) au' per akvo kie oni antaŭe estis boligintaj ajlon kaj salon, por haltigi la sangofluon oni surmetis bulon da detranc'ita tabako kaj envolvis g'in.

Pli sekure , en kazoj de vundig'o , la popolkuracistoj prikonsideris la bruligitan oleon. Super la vundon oni tenis draton kun malsekigita per olivolio tukpeco pura, sur kiun oni surs'utis (au' ne) sulfuran pulvoron. La tukpeco ekbruligita kaj kelkaj gutoj filtrig'intaj el g'i dum la brulig'ado, oni surj'etis sur vundon.. La kvanto de gutoj mezurig'is laŭ la spaco de la vundo. Sammaniere oni uzis la rug'an pinon, kiun oni bruligis kaj lasis la fluantan ties vaskon elgutig'i sur vundon. Kelkaj kuracistoj surj'etis juniperan gudron.

Por la vundoj kau'zitaj de armiloj estas uzita ankau' la mang'a salo per kiu oni plenigis la truon postlasita de kuglo. Se la kuglo estis penetrinta la korpon, samtiel per salo oni plenigis ankau' la alian truon, do la vundo fermig'os ambau'flanke per salo. Sur truojn oni metis vaksajn pastofoliojn ligante ilin per puraj tolaj'aj rimenoj. Kelkaj popolaj kuracistoj estas uzintaj ankau' la cepon premigitan per salo. Ankau' la filtrigitan marinaj'on de fromag'o oni uzis kiel malinfektigilon, kiam estis trapikita la

piedo au' la mano, surpasigante g'in preme per iu tritika pajlo. Poste la vundo
fermig'is per detranc'ita tabako ligante g'in per pura teksaj'o.
Enesperantigis ardhyl Selimi